

Kulturaj Kajeroj

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : P. BABIN, prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, 44 - NANTES, Francujo

JARABONO :

Jarabono : 40 fkoj

P. BABIN
13, boulevard de la Chauviniere
44 - Nantes
P.C.K. Nantes : 2.813.61

(Vidu la liston de niaj perantoj sur pago 4)

MARTO - APRILO

1980 - 2

KULTURAJ KAJEROJ

1980 MARTO-APRILO

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

Jean-Paul Guillot, 21, rue des Aubépines
86 - Poitiers

Komitatanoj :

Pierre Babin
Pierre Chevalier
Simone Guillot

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento, kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

El Grésillon

Esperanto tra la mondo — A. Frangeul

Iom pri la pasinteco de la franca urbeto Baugé — B. Cheverry

Regionaj lingvoj en Francio — H. Kristos

Finnugristo - Esperantisto Emil Nestor Setälä — B. Golden

Samivel kaj liaj ordonoj — J.-P. Beau

La sangopreparitaj kolomboj — P. Arène, trad. R. Gonin

Por via distro

KULTURAJ KAJEROJ ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ spegulos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ respondos al gramatikaj demandoj

KULTURAJ KAJEROJ prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu ai vi. Sendu viajn sugestojn kaj kritikojn.

El Grésillon

UNUA JARO DE LA VIVO DE LA ESPERANTO-DOMO

La ĉekkontoj estis malplenaj en januaro 1952 kaj ankaŭ la kastelo estis malplena ; mankis ĉio : tabloj, seĝoj, ŝrankoj, elektra kurento, kuranta akvo, manĝiloj, ktp...

El la kastela meblaro, Micard povis aĉeti nur ĝardenbenkojn kaj... kuirfornon antikvan. La alvokoj en « Esperanto-Lernejo » rekomenciĝis, monpetoj por aĉeti la necesajn aĵojn. « Ni bezonas 200.000 frankojn (1) por aĉeti tablojn, seĝojn, kuirilojn. Ni devas aĉeti elektrajn ilojn, lavujojn, litojn. Kompleta lito kostas 20.000 frankojn (1) kaj ni bezonas 50 el ili. Laboremuloj estis alvokitaj : « Ni deziras mem instali la elektran kurenton en la kastelo inter la 13-a kaj la 20-a de aprilo. Ni bezonas la helpon de 3 aŭ 4 amikoj ». La kuranta akvo estis sammaniere instalita.

Micard ne nur alvokis la aliajn al laboro. Li mem faris multon kaj ankaŭ S-ino Micard. Ili transportis meblojn, littukojn, kovrilojn... Micard ankaŭ pretigis programon por la sekvonta somero. Estis necese, ke gastoj venu dum la somero por pruvi, ke la Esperanto-Domo povas vivi kaj ankaŭ, kompreneble, por plenigi la kason. Jen la programo proponita en marto 1952 :

1-14 julio : Internacia Renkontiĝo kaj teatra studperiodo en Esperanto.

15 julio - 4 aŭgusto ; Somerlernejo de GEE.

5-17 aŭgusto : Dua somerlernejo por ĉiuj.

18-31 aŭgusto : Seminario kaj dua internacia renkontiĝo.

Septembro : kastelo malfermita por tiuj, kiuj deziros ripozi.

Por havigi monon al la asocio Micard ankaŭ imagis la organizon de loterio, en aprilo 1952 : « Ni havas la rajton organizi loterion, kun kapitalo de 1.500.000 frankoj (1) dividita en 15.000 biletoj po 100 frankoj (1). La gajno estos dediĉita al meblado de la kastelo. Ni tuj ekvendas la biletojn kaj petas ĉiujn esperantistojn, ke ili faru klopodon por disvendigi ilin. Jen la lototaj objektoj : lavmaŝino, tendo, biciklo, radioaparato... La lotado okazos en Gresillon la 31-an de aŭgusto 1952. »

Fine venis la somero kaj, la unuan fojon, la Esperanto-Domo malfermis siajn pordojn al la esperantistoj. La litoj apartenis al lernejestro de Baugé, kiu konsentis pruntedoni sian materialon dum la ferioj. La littukoj kaj kovriloj apartenis al la ĉeestantoj kiuj kunportis la plimulton el la necesaĵoj. S-ino Micard tute sola, okupiĝis pri la preparado de la manĝoj. Ĉiuj ĉeestantoj siavice lavis la telerojn, senŝeligis la legomojn, ktp... Ne estis servistaro ĉar la financa situacio ne ebligis tian « lukson » pioniroj de la restadoj en Gresillon, kiuj laboris en la kuirejo kaj en la lernoĉambroj, estis 150 tiun someron. Per sia ĉeesto ili donis al la Esperanto-Domo la unuan impulson. Ili ebligis la tiujarajn elspezojn kaj pruvis, ke Gresillon povas vivi.

La oficiala inaŭguro, la 31-an de aŭgusto, ne nur malfermis la pordojn al la estonteco. Ĝi montris al la eksterlandaj kaj francaj eminentuloj, al la lokaj urbestroj, kiuj ĉeestis la manifestacion, jam vivantan Esperanto-Domon.

(1) Malnovaj frankoj, kompreneble.

Esperanto tra la Mondo

Interesaj novaĵoj el Usono :

— U.E.A. starigis apartan oficejon en Nov-Jorko. La ĉefaj taskoj de tiu surloka oficejo estos : prizorgado de la informlaboro kaj kunlaboraj rilatoj ĉe la diversaj instancoj de Unuiĝintaj Nacioj. La adreso estas : 777, United Nations Plaza.

— La eldonejo de la revuo « Lingvaj problemoj kaj lingvo-planado » estas de nun la eldonejo de la universitato de Texas. La planoj de la redaktoro, D-ro Richard E. Wood, celas ampleksigon de la revuo kaj rapidan kreskon de la abonantaro. La revuo daŭre entenos materialon ankaŭ en Esperanto. La adreso estos : University of Texas Press, Austin, TX 78712, U.S.A.

— D-ro Pierre Janton, profesoro de angla lingvo kaj de esperanto en la universitato de Clemont-Ferrand, Francio, estis gasta profesoro dum Januaro, Februaro kaj Marto, ĉe la universitato Suda Illinois, en urbo Edwadsville.

Li estis, interalie, invitita de la filozofia fako de tiu universitato, kie Esperanto estas oficiale instruata al vasta studentaro. Prof. Janton, cetere, estis gasto de aliaj universitatoj.

Lia libro « L'Esperanto », kiu aperis en la franca kolekto « Que sais-je ? », kaj kiu aperis ankaŭ en germana lingvo, estas nun tradukata en la anglan en kunlaboro kun D-ro Tonkin.

— La sekcio « Aplika lingvistiko », en la universitato Illinois, en la urbo Urbana, finance apogos oficialan simpozion ĉe la universitato, la 9an de Majo.

La titolo estos : « Influo de la gepatra lingvo je Esperanto ». Kun-estroj de la simpozio estos Profesoroj Chin Chuan Cheng kaj Bruce A. Sherwood. Tiu lasta instruas en la fako de fiziko kaj en la Centro de Perkomputila instruado, ĉe la sama universitato.

Adreso de Prof. Bruce A. Sherwood : 252, Engineering Research Lab., University of Ilinois, Urbana, Illinois 61801, U.S.A.

Rapidaj progresoj de Esperanto en Kubo :

Komence de Februaro, proksimume 500 gelernantoj ricevis sian ateston de bona studado en Esperanto-kursoj, kaj 1000 aliaj komencis studi en novaj kursoj. Lernolibroj kaj vortaroj grave mankas en tiu renaskiĝanta kuba movado. Kuba Esperanto-Asocio dankeme ricevus helpon tiurilate. Jen ĝia adreso : Poŝtkesto 314, Habana 1, Kubo.

Kiel Tito, la nova jugoslava prezidento lernis Esperanton :

Lazar Koliševski, la posteulo de Josip Broz Tito, ankaŭ konas Esperanton. Li estis tre aktiva membro de la Esperanto-Societo en Beogrado antaŭ la milito.

En Ĉinio :

Esperanto daŭre progresas en Ĉinio. Jam Ĉina Esperanto-Ligo petis aliĝon al U.E.A.

Ĉiutage, oni povas aŭskulti la elsendojn de Radio-Pekino en internacia lingvo, kaj la ilustrita revuo « El Popola Ĉinio » liveras ĉiumonate interesajn legaĵojn.

Por la biciklantoj :

Fondiĝis en Germanujo Biciklista Esperanto Movado Internacia (B.E.M.I.).

Informas : T. Bormann, Schärstr. 26, D-2050 Hamburg 80.

Novaj eldonaĵoj :

— « Baza literature krestomatio », 266 paĝoj. Originalaj eroj de verkoj de 56 aŭtoroj, por montri la evoluon de la esperanta literaturo.

— « La fenomeno Svislando », de Arthur Baur. Prezento de la diversaj aspektoj de Svislando (168 paĝoj).

— « Libro de romanoj » de V. Benczik. Resumoj de la ses romanoj de la du unuaj originalaj romanistoj de nia lingvo : Vallienne kaj Luyken.

— Tri sciencaj studoj (el Someraj Universitataj Kursoj de Lieĝo) : « Kiel personeco sin strukturas » (Claude Piron), « Enkonduko en la teorian biologion » (B. Meszaros), « La nuntempa ĉelkariologio kaj citotaksonomio » (B. Meszaros).

— « Kiel diri... ? » (Esperanta Frazeologio, 5000 esprimoj) 170-paĝa libro de Lentaigne. Utila verkaĵo kun abunda materialo, ĉefe ĉerpita el « Plena Ilustrita Vortaro », « Plena Gramatiko », kaj la hungara « Domfabriko », kaj grupita ĉirkaŭ 67 « ideoj ». Malalta prezo : 12 FF.

— « Fervoja leksikono », franca — esperanta, kun indekso en Esperanto. 165 paĝoj, 5200 terminoj. Prezo : 26 FF.

— S.A.T. — amikaro ĵus eldonis novan « Dictionnaire de poche » (poŝvortaron) Esperanto-Français/Français-Esperanto. Ĝi enhavas 130 paĝojn kun tri gravaj partoj : gramatika, Esperanto-Franca kaj Franca-Esperanto vortaroj.

— U.E.A. tre baldaŭ eldonos « Plena analiza gramatiko » de Kalocsay kaj Waringhien.

— La libro-servo de S.A.T.-amikaro anoncas la eldonon de kasedo por la franclingva lernolibro « Cours rationnel et complet d'Esperanto ».

— Jam aperis « Esperantologiaj Eseoj IV — 1887 kaj la sekvo » de Prof. G. Waringhien.

Esperantista Semajno ĉe Maro :

Ĝi okazos de la 21a ĝis la 28a de septembro en Lazaret. Lazaret estas tre agrabla kaj konforta feriejo en parko ĉe la mediteranea maro. Sète estas interesa haveno, 20 km okcidente de Montpellier sur la fervojo-linio Marseille-Bordeaux.

Grava turisma programo dum 1980 en Pollando :

La polaj esperantistoj dissendis informilojn pri multaj esperanto-renkontoj, dum 1980. Por informo, sin turni al Pola Esperanto-Asocio, Komisiono pri Turismo, Str. M. Sklodowskiej- Curie 10, PL-85 094, Bydgoszcz, Pollando.

Pri la esperantistaj mondcivitanoj :

Lastan someron, okazis en la kastelo de la Lambertie, en Suda Francio, sesio de Instituto pri mondistaj studoj. Tago estis dediĉita al Esperanto kaj S-ro Albault pri la temo : « Ĉu monda kulturo estas ebla ? » La medio de la mondcivitanoj estas tre favora al nia lingvo kaj multaj esperantistoj aliĝu al « Internacia Esperanto-Centro de la Mondcivitanoj », ĉe S-ino Renée Volpelière, 8, rue Rouget-de-Lisle, 30 000 Nîmes (Francio).

Iom pri la pasinteco de la franca urbeto BAUGE, kie situas nia Esperantista Kulturdomo "GRESILLON"

El la plej diversdevenaj gesamideanoj, kiuj de 1952 vizitis Gresillon, multaj interesiĝis — kiel, verŝajne aliaj interesiĝos — pri la apuda urbeto Baugé, tipe franca, kun multe da restaĵoj el la antaŭaj jarcentoj.

Okulfrapis plurajn el niaj gastoj strat-tabeloj je la nomo de virinoj.

Apud la Baugé-hospitalo, du stratoj, unu je la nomo « Anna de Melun », alia je tiu de « Marta de la Beausse » voj-kruciĝas sur eta placo kun tria, tiu-ĉi nomita strato « Zamenhof », kiu kondukas al Gresillon. Jen kio alproksimiĝas al ni tiuj du virinoj, ĉu ne ? Aliparte, la najbara hospitalo de Baugé restas memorligita al ili, el devenoj tre diversaj sed ambaŭ grandanimaj.

Kune, do, ni reiros al la franca 17-a jarcento. Tiam, Baugé, fondita de sep jarcentoj, restas ĉirkaŭata de remparoj. Tamen, de tiam la komunumo plietendiĝas ĉirkaŭen. La teruraj rememoraĵoj de la Centjara Milito estas for. Tiuj de la enlandaj Religiaj Militoj restas sufiĉe akraj, kun gravaj domaĝoj ankoraŭ videblaj en la urbo. Kaj, se komence de la 17-a jarcento, komercistoj kaj terposedantoj estis retrovintaj iom da prospero, restis multnombraj senhavuloj, kiuj en okazo de malsanoj povis trovi helpon nur de bonkorulo aŭ almozdonantoj. Kiel terura povis esti la mizero, kiam granda epidemio frapis ĉe preskaŭ ĉiuj urbaj pordoj ?

Ni reiru en la jaron 1640 por aŭskulti du Baugé-anoj, tiel alparolantaj : « Sinjoro, kiajn novaĵojn vi kunportas hodiaŭ el via vojaĝo al Beaufort ? » — « Ege malbonaj, najbaro. Epidemio rekomenciĝis en la tuta distrikto. Mortantoj estas pli kaj pli multnombraj. Raraj estas la familioj kiuj ankoraŭ ne perdis anon, kaj jam la nigra standardo flirtas sur ĉiuj turoj de la preĝejoj. » — « La nigra standardo ! Teruraĵo ! Baldaŭ nia hospitalo devos larĝe malfermi siajn pordojn al ĉaroj de malsanuloj... kaj, ni, fermi la niajn, kaj vivi hejme, se ni ne volas esti infektitaj ! »

Ja, la novaĵo raportita de la vojaĝanto estis vere : Unufoje pli, epidemio de holero estis domaĝanta tiun-ĉi Anjuan regionon, kaj por antaŭaverti la pasantojn estis kutimo starigi ĉe la supro de la preĝejturo nigran standardon, kiu de malproksime anoncis la minacantan danĝeron por, ke prudente, ili ne eniru la infektitan urbon.

Same, la alia interparolanto ne eraris, dirante ke baldaŭ la stratoj en Baugé estos plenplenaj da veturiloj kondukantaj la malsanulojn de la ĉirkaŭaĵoj al la urba hospitalo. Oni devas konsideri, ke ĉe tiu epoko, kuracistoj — aparte en kamparo — estis ege malmultaj, kaj la parencaroj pli vole serĉis sekurecon, ne nur por la malsanuloj, sed ankaŭ por si mem, kondukante tien la infektitojn :

Sekureco por si mem ? Eble ! Resaniĝo por la malsanuloj ? Ne certe ! Fakte, en la 1640-a, la nebonaj konstruaĵoj kiujn pompe oni nomis hospitaloj estis en tiaj okazoj tute ne sufiĉaj, malgrandaj, ege malnovaj ; multaj konstruitaj de la mezepoko, plejofte konsistantaj el kelkaj ĉambroj malfermantaj sur kortoj, somere polvoplenaj, vintre kotegaj. Ĉar tre malriĉaj pri meblaro, ofte oni devis enlitigi du aŭ tri malsanulojn en sama lito, eĉ en okazo de epidemio kuŝigi ilin teren sur pajlo. Ĉu almenaŭ ili ricevis en tiaj hospitaloj la necesajn kuracadojn ? Ve ! ne ĉiam ! Ofte, flegistinoj estis simplaj maljunulinoj pli zorgantaj eltiri kelkajn monerojn el la sako de la malsanuloj, ol flegi ilin. Kaj ne estis kuracisto en la hospitalo mem. Li venis de la urbo, kie kompreneble li, unue, estis prizorganta sian propran klientaron.

Tamen, de jam, kiel de ĉiam, bonkoraj kaj almozdonemaj personoj provis starigi novajn, aŭ reorganizi malnovajn, hospitalojn por pli granda bono de la malsanuloj. Precize en Baugé, estis pia virino, kiu iniciatis tiusencen, ĝuste post tiu terura epidemio de 1640, kiam ŝia propra frato mortis en plej kruelaj cirkonstancoj. Dudekjara li estis, kaj lia morto tiel impresis la fratinon, ke ŝi promesis al si dediĉi sian tutan vivon al flegado de malriĉuloj kaj malsanuloj. Marta estis ŝia nomo. Ve ! ŝi estis riĉa nur de sindonemo. Kion fari ? Unue, ŝi iris al la urbestraro, kies anoj ridis kaj konsideris ŝin kiel frenezulinon. Ili diris : « Ĉu vi kredas ke mono superŝutas nian kason, Baugé estas tro malgranda urbo por havigi al si luksan hospitalon ! » — « Ne luksan mi deziras, grumblis Marta, nur taŭgan kaj dignan por homoj malsanaj. Do, se vi ne povas elspezi monon, donu al mi almenaŭ tiun nekultureblan terenon kiu ĉe eniro de la urbo utilas al neniu. Tie, mi mem konstruos mian hospitalon ». La urbestraranoj levis la ŝultrojn sed, fakte, ĉar tiu tereno por ili estis senvalora, ili konsentis cedi ĝin al la kuragemulino. Tiu-ĉi havis nur dudek groŝojn en la poŝo... sed plano en la kapo !

Sur la tereno ŝi plantis fortan foston, kun almozskatolo, kaj tabulon indikantan : « Tie staros la hospitalo de Baugé. Donu por la malriĉuloj ! » kaj, brave, ŝi subskribis per sia nomo : Marta de la Beausse.

Familio « de la Beausse » estis honorinde konata en la tuta regiono. En la urbo mem Marta kolektis malavarajn donacojn. Tiam, ŝi luprenis ĉevalon kaj veturilon kaj komencis trakuri la kamparon. Si memorigis la malbonan staton de la iama hospitalo antaŭvidigis la servojn donontajn de pli konvena establo. Kaj, ĉar estis preskaŭ neniu familio kiu ne suferis pro la sentaŭgeco de la malsanulejo, ĉiuj konsentis laŭpove helpi al Marta por konstruado de nova.

Riĉa de konvena sumo, ŝi konfidis konstruadon de la unuaj loĝejoj al arkitekto. Poste, ŝi iris en urbon La Flèche kie estis fondita, iom antaŭe, virina komunumo edukanta religiulinojn-flegistinojn. Ŝi petis de la estrino kelkajn deĵorantinojn kaj en malpli ol unu jaro, Marta sukcesis malfermi la unuan ĉambron de sia hospitalo... verdire tre modesta kaj malriĉa : la religiulinoj estis devigataj funkcii pere de publika kompatemo. Evidentiĝis, ke tia situacio ne estos longdaŭra. Tamen, neniam Marta konsentis rezigni pri sia projekto. Obstine, ŝi kuraĝigis siajn kunulinojn, kontraŭstaris ĉiujn kritikojn, kaj mokojn... kaj...

Kaj iun tagon, kiel en feina rakonto, veturilo haltis antaŭ la malgranda hospitalo. Koĉero elsaltas, frapadas ĉe la pordo kaj diras : « Jen, en mia veturilo estas vojaĝantino tre laca, tre suferanta, kiu petas de vi gastadon. » — « Konsentite » tuj respondis Marta « Ni ne estas riĉaj, tamen en ĉiuj okazoj volàs helpi kiu suferas ». Tiam, eliris el la veturilo virino ankoraŭ juna, modeste vestita, kaj pene marŝanta. Kiam instalita kaj iom ripozita, ŝi konfidis al Marta, ke venante de malproksime ŝi estis iranta al La Flèche por tien viziti abatejon de virinoj kaj inter ili ripozi kelkatempe ; kiam terura lacego devigis ŝin halti en Baugé. « Bone vi faris » diris Marta « ĉar niaj propraj flegistinoj venas el la religia komunumo de La Flèche, tute ne bezonas ke vi iru pli. » Kaj ŝi longe rakontis, kiel, kial, kiam, ŝi estis starigantа sian establon... ne forgesante aldoni pri la sorto-ŝanĝoj kiuj senĉese maltrankviligas ŝin.

La juna virino silente aŭskultis, sed aspektis treege interesata. Post kelkaj tagoj, denove bonstata, ŝi ne plu parolis pri foriro, kontraŭe, iris al Marta kaj diris : « Vi estas diskreta, ĉu ne ? Mi ne deziras riveli mian nomon, tamen povas konfidi, ke mi posedas havaĵon, kiun pro personaj kaŭzoj, mi ne plu volas uzi por mi mem. Via

propra sindonemo, via energio, kortuŝis min kaj, se vi konsentas, anstataŭ ol iri en La Flèche, mi restos kune kun vi por helpadi per mi mem ankaŭ per mia mono : unu sola kondiĉo, neniam vi devos serĉi mian veran identecon. Por vi kaj kunulinoj, mi estos fratino de « La Haye ».

Post longaj pripensoj, Marta akceptis kaj neniam poste bedaŭris. Fratino de La Haye tuj elmontris eksterordinarajn sindonemon kaj agemecon. Ŝi postulis, ke tuj oni enkonduku novajn planojn de ŝi starigitaj por finkonstrui grandan hospitalon. Al Marta, timema pro kostoj, ŝi respondis : « Lasu, neniam mia mono estos pli bone uzata ». Pligrandiĝoj, plibonigoj, do, estis faritaj. Hospitalo de Baugé iĝis vera modelo. Oni bezonis pliajn flegistinojn. La malŝparema donacantino daŭre partoprenis ĉiujn iliajn taskojn eĉ la malpli allogajn, lasante al Marta de la Beausse la estrecon kaj internan organizadon kio permesis al ŝi iri por plistudi en la « Salpétrière », fama Pariza hospitalo kaj en tiu de Angers (historia monumento, kiu nun enhavas la faman modernan tapiserion « La Kanto de l'Mondo » de Johano Lurcat). Anna de La Haye lernas pri ĉiuj medicinaj plantoj kaj tiamaj medikamentoj, piloloj, ungventoj. Ŝi malavare aĉetas potojn, botelojn, por ilin enmeti aŭ fabriki. Tiel komenciĝas starigado de la bela hospitala-apotekejo en Baugé.

Ve ! Unu fojon pli, plagoj falis sur Anĵu. La Pariza « Frondo », nobela ribelo kontraŭ la reĝopovo, trovis eĥon en tiu regiono. Iliaflanke, la Angersaj burĝoj ribelis por protesti kontraŭ pezai impoŝtoj kaj — jam — organizis strikadon pri impoŝt-pago.

La reĝa povo, kies iama estro estis la severa ministro Mazarin, kontraŭstaris, sendante en la provincon tutan regimenton, kies soldatoj, devige, estis gastigitaj de la loĝantoj mem. Terura puno. Ĉe tiu epoko, kiam ne estis kazernoj, la soldatoj estis ĉu batalantaj sur militkampoj kaj bivakantaj, ĉu loĝantaj ĉe urbanoj aŭ vilaĝanoj kie, ĝenerale, ili ne rolis kiel ĝentilhomoj ! Plej ofte malkontentaj, ili rompis meblaron, ŝtelis riĉaĵojn, timigis virinojn. Pli kaj pli grumblis la Anĵuanoj. Pli kaj pli severe respondis Mazarin. Finfine estis vera interna milito. La regentino, Maria de Médicis, patrino de la tro juna Ludoviko la dek-tria, kaj Mazarin decidis sendi novan musketistan regimenton en Anĵu.

Kiam, en la regiono oni sciis pri tio estis granda malespero. Tamen, en Baugé mem la loĝantoj restis sufiĉe optimismaj. Ja, malnova traktado inter la antaŭaj dukoj kaj la franca reĝo malpermesis eniron de la trupoj en la urbon. Despli grandaj estis la surprizo kaj emocio kiam oni aŭdis pri mesaĝo portita de marŝal-sendato al la urbestraro : kion povus deziri la marŝalo ? Tion : ĉar li estis trovanta tute dezertitan ĉirkaŭantan regionon ; li estas devigata kantonmeti siajn trupojn en Baugé dum kelkaj tagoj postulante por ili loĝejon, fajron, kandelojn, kaj nutraĵojn tiom por la soldatoj, kiom por la ĉevaloj.

Certa pri siaj rajtoj, la urbestraro nete rifuzis. Akra diskutado sekvis ĝis kiam estrarano pli kolerema ol la aliaj frapis la leŭtenanton. Grava ofendaĵo ! Plena de furoro, la marŝal-reprezentanto diris : « Mi mem ne volas dueli kun vi, kampulaĉoj ! estos la tuta regimento kiu prenos vian urbon ! » Kaj li saltis sur sian ĉevalon. Konsterno, teruro premis la civitanoj. La urbestraro decidis elekti delegacion kun celo iri al la marŝalo d'Hocquencourt mem, kaj peteci, ke li indulgu kaj malpermesu rabadon de la civito.

Ĉe la momento, kiam la delegitoj estis tuj elirontaj, jen Marta de la Beausse kiu alvenas petante por fratino de la Haye permeson akompani la delegacion. « Kial ? » demandis la urbestro. « Mi ne scias » — respondis Marta — « Sed, kiam ŝi aŭdis pri la afero, kaj la nomo de la marŝalo, ŝi nepre postulis la rajton eniri la delegacion » — « Do, ŝi venu, ŝi ne povos fuŝi pli la situacion » diris la urbestro.

Kiam la delegacio alvenis al la kampadejo, la marŝalo, krude, rifuzis aŭdi iun ajn peton. « Vi estas indignaj burĝoj, kiujn mi devus pendigi. Mi tute ne volas deteni miajn soldatojn detrui vian urbon. Tiu faro estos ekzemplo ! » — « Ĉu ankaŭ vi lasos bruli mian hospitalon, miajn fratinojn, kiuj sindonas al kuracado de malsanuloj ? » diris Anna eliranta el malantaŭ la grupo. La marŝalo ekkriis pro surprizo, demetis sian grandan ĉapelon kun plumo ĝisteren, profunde reverencis, kaj diris : « Princino ! Ĉu estas eble ? ĉu vere estas vi ? » — « Jes, estas mi, kiu retiriĝis el la mondo, kaj sekrete vivas en Baugé. Nur la granda danĝero kiu minacas tiun urbon kaj mian hospitalon povis eltiri min el mia inkogniteco. Ĉu ankoraŭ vi kuraĝos ripeti viajn minacojn ? » — « Certe ne, Sinjorino, ĉar peto de vi estas por mi ordono... sed, la Baugé-anoj estas bonŝancaj vin havi kiel protektantino ! Tamen unu favoron miavice mi petas : Mia regimento defilos tra la urbo, antaŭ via hospitalo. Pli ol unu el la oficiroj estos kontentaj saluti vin ! »

Tiel Baugé-anoj retrovis kvietecon, tiel ili konis la veran identecon de sia duobla bonfarantino : Anna de Melun, princino d'Espinov apartenis al tre fama flandra familio, posteulino de granduloj el Hispanujo kaj Francujo, unu el la plej altrangaj damoj en la reĝa kortego, kie ŝi dum jaroj, estis la plej admirata inter ĉiuj kiam, iun tagon, ŝi estis for. Kien ? Vojaĝante tra la mondo, oni diris.

Nun, vi scias kiel ŝi haltis en Baugé, kiel abomenante la vanajn riĉaĵojn, ŝi oferdonis sian vivon al malsanuloj, kiel de princino ŝi iĝis servantino

Post la foriro de la marŝalo kaj liaj trupoj, ŝi denove reprenis sian humilan rolon postulante, ke ĉiu respektu ŝian libervolon kaj sekreton.

De post, la Civito ne ĉesis honorigi Anna de Melun, kun granda dankemo.

Vi mem — eble tion vi jam faris — vizitante Gresillon kaj Baugé, povas konatiĝi kun la malavareco de la princino, rilate la urban hospitalon : sufiĉas al vi viziti la tiean apotekon, unika en Francujo pro ĝiaj kadro kaj aranĝo. Tie la tradicio restis seninterompita dum tri jarcentoj. Eĉ la Revolucio pasis sen detrui aŭ ŝanĝi. Plej aŭtentikaj restas la pargeto el riĉaj marketraĵoj, la plafono el klozoneoj, l'eleganta meblaro, la potoj el dekoraciita fajenco el Rouen, dikventraj boteloj, skatoloj ankoraŭ entenantaj malnovajn kaj sendanĝerajn medikamentojn.

Se, okaze, tiuj rememoroj incitas vin rakonti al aliaj, nepre menciu, ke tiu kvazaŭ muzeo situas en Baugé, ĉe strato Zamenhof kiu kondukas al Gresillon. Kaj, per ia reproksimiĝo de la ideoj, vi mem pripensu, ke kiu ajn estu la tempoj, la homoj, la moroj kaj ideoj, pli necesas por lanĉi nobl-idealan aferon, unue, kuraĝo, optimismo, sindonemo, interhelpo. Mono certe necesegas. Sed des pli facile ĝi venas kiam afero jam estas firme staranta.


Pli proksima al vi, diversmaniere, ol la Baugé-hospitalo, via Gresillon, tamen estas moderna ellaborado de pioniroj, al kiuj la ĉi-supre menciitaj kvalitoj ne mankis. Kai se nun la Esperantista Kulturdomo aspektas al vi prospera ne forgesu la pionirojn, kiuj, ne tre monhavantaj, tamen donis al la esperantistaro preskaŭ luksajn kastelon kaj bienon.

B. Cheverry.

REGIONAJ LINGVOJ EN FRANCIO

Antaŭ ol komenci, oni tradicie sin demandas : Kio estas regiona lingvo ? Kio ne estas lingvo, sed nur dialekto, aŭ idiomo, aŭ ĵargono ? Kiu estas la distinga kriterio ? Por esti ne nur idiomo sed lingvo, ĉu oni devas posedi gramatikon ? skribitan literaturon ? sufiĉe grandan surfacon ? kiom da km² ? kiom da homoj ? Kiel ilin elnombri ? ĉu ne pli bone paroli pri regionaj **kulturoj ?**

Ĝenerale, oni konsideras, ke ekzistas en Francio nun sep regionaj lingvoj : Alzaca, Vaska, Bretona, Flandra, Kataluna, Korsika, kaj Okcitana. Jen sur mapo ilia spaco.



Unua parto : la nuna stato de la regionaj lingvoj.

1 - Ĝi treege dependas de la **historia kaj politika situacio kaj evoluo** de la regiono. Laŭ libraj informoj, jen rapida portreto de la regionoj : **Bretonio** : La bretona lingvo estas branĉo de la vasta arbo de la keltaj lingvoj, kies aliaj branĉoj ankoraŭ vivas, en Skotlando, Kimrujo kaj Irlando, kiel oni jam povis legi en tre interesa artikolo de F. le Magadure aperinta en Kulturaj Kajeroj. La tuta regiono ĝuas en Francio grandan modon, jam de multaj jaroj. La disvolviĝo de turismo kaŭzis grandan pasion en la koroj de ne-Bretonoj por la bretonaj muziko, kuirarto, mebloj, antaŭnomoj, folkloro... ktp. Bretonio dum pluraj jarcentoj, kaj precipe post la unuiĝo al Francio en 1532, spertis malfeliĉan perdon de sia individueco, laŭ politikaj, ekonomiaj, kulturaj vidpunktoj. Ankoraŭ nuntempe, la Bretonoj spertas gravan staton de dependeco, malhavo de aŭtonomio, de vera kunlaborado pri sia propra vivo, la formetado de ĉiu respondeco pri sia evoluo.

La dramo de **Alzaco** kuŝas en ĝia historio kaj geografio : ĝuste inter Francio kaj Germanio. Alzaco restis sen rilatoj kun Francio ĝis 1681, kiam ĝi estis donita al la franca regno. Dum du jarcentoj, ĝi restis franca, sed poste, en malpli ol cent jaroj, ĝi spertis 4 ŝanĝojn. Kiel oni facile komprenas pri Loreno (kiu spertis la saman situacion) legante la romanon de R. Schwartz « Kiel akvo de l'rivero », tiu vere drama situacio kaŭzis profundan psikan ŝokon ĉe ĉiu alzacano, ĉe ĉiu familio ; je tia grado, ke oni povis fari la psikanalizon de la tuta popolo. Nek Francio, nek Germanio komprenis, ke Alzaco ja havas sian propran karakteron.

La Flandra estas la lingvo de nur kelkaj Francoj, kaj mi konsideras, ke tiu-ĉi estas pli la regiona lingvo de alia lando ol de Francio.

Vaskujo posedas nur parteton de sia spaco en Francio ; la pli multo kuŝas en Hispanio. Tio nur pro politikaj kialoj. Tamen, depost la dua mondmilito, kaj malgraŭ la agado de ambaŭ regnoj, la francaj vaskoj sentas sin plej proksimaj de la hispanaj vaskoj kiuj bataliis kontraŭ al premado de ĝeneralo Franko. La « oficiala » nomo de la lando, laŭ la tre potenca Vaska Nacionalista Partio estas EUSKADI, kaj la Vaskoj parolas pri Euskadi-Nordo (= en Francio), kaj Euskadi-Sudo (= en Hispanio). La vaska lingvo estas, kiel Esperanto kaj la Albana, aglutina (pruve : euske = vaska, + adi = komunumo).

Katalunio en Francio estas nur parteto de la tuta katalunio : la franca parto nomiĝas Rusiljono, kies kapitalo estas Perpignan. Franca kaj hispana katalunioj estis unu sola regiono ĝis la traktado de la Pirineoj en 1659. Post tiu dato, Rusiljono evoluis al pli franca aspekto, dum la hispana katalunio restis tre aŭtonoma. En Rusiljono, nuntempe, multaj estas la hispanaj katalunaj elmigrintoj kiuj sentas sin hejme des pli ke nur kelkaj vortoj de la lingvoj malsimilas. Nun, en Rusiljono, forta reago aperas en kelkaj medioj, kontraŭ la imperiista sinteno de la ŝtato, laŭ la samaj temoj kiel en Okcitanio.

Korsiko (en la Mediteraneo) montras, eble pro sia insula stato tre grandan emon al aŭtonomio, subtenatan de tre fortaj agadoj. Ĝia historio estas pli malpli konstanta batalo por aŭtonomio, ĉu kontraŭ Genovo, ĉu kontraŭ Francio post la 18a jarcento. Dum nia jarcento, tiu batalo, ofte sanga, restis plurajn jarojn kaŝata en la montoj de la insul-centro, pro la tre francema sinteno de la riĉaj korsikanoj de la marbordo. Multaj korsikanoj elmigris al Francio, kie ili spertis la neceson franciĝi, dum paralele, la franca ŝtato favoris la enmigradon al Korsiko de multaj francoj el nord-Afriko post la perdo de nia kolonio en Alĝerio. La rezulto de tiu duobla ŝanĝo estis ke la ekvilibro de Korsiko fariĝis tre necerta : en ĝi, preskaŭ pli da ne-korsikanoj ol da korsikanoj. Ŝajnas tamen ke la sangaj okazajoj en Aleria en 1975 donis novan impulson al la aŭtonomistaj demandoj de la korsikanoj, kaj refortigis la unuecon de la homoj.

Okcitanio estas granda regiono sen unuopa historio ; la apero de tiu regiono inter la aliaj datumas nur de la dua mondmilito : ĝi reprezentas la parton de Francio ne okupitan de la germanoj. En pasinteco, 6 provincoj kuŝis en la sudo de la lando ; ili faris sian propran historion, laŭ certa unueco, tamen. Nun, la regiono Okcitanio konsideras sin la kontraŭon de Nordo, kaj pli precize, de la regiono de Parizo. Depost la dua mondmilito, ne nur intelektuloj, sed ĉiuj homoj provas rekonkeri sian regionon. Tion pruvas la ribelo de la kamparanoj en « le Larzac », la ribeloj de la vinkulturistoj en Langvedoko, la forĵeto de la tipo de ekonomio kiu igas ke la laborantoj foriras al la pariza regiono, la rifuzo de la turismigo de la regiono, kaj la vekiĝo de ilia lingva kaj kultura konscio.

2. — **Kvar demandoj pri la homoj.**

Mi faris enketon ĉe pluraj regionalistoj ; ĉu respondeculoj de movadoj, ĉu nuraj uzantoj de la regiona lingvo. Mi sendis mian demandaron al homoj en la sep regionoj kiujn mi deziris studi, sed la respondoj malegale venis, tial ke la ĉi-suba portreto enhavas « ombrajn partojn ». Suduloj montriĝis pli babilemaj ! La respondojn al miaj demandoj, mi aranĝas en 4 ĉapitroj : Kiu parolas la regionan lingvon ?

Kial ?

Kiel oni povas sperti en ĉiutaga vivo, ke la regiona lingvo vere vivas ?

Kiel oni ĝin lernas ?

1. — **Kiu parolas la regionan lingvon ?**

Iom simpliginte la aferojn, mi povas diri, ke 2 tipoj de homoj uzas la regionajn lingvojn :

— tiuj kiuj ĝin lernis denaske kaj hejme ; ĝenerale, maljunuloj kaj kamparanoj ;

— tiuj kiuj pro elekto ĝin lernis ; ekzemple gefiloj de regionemaj gepatroj : ili iras al speciala lernejo, aŭ almenaŭ al specialaj kursoj ; ankaŭ plenkreskuloj fariĝis uzantoj de la regiona lingvo. Jen la respondo de la respondeculo en Perpignan : « En Rusiljono, precipe maljunuloj parolas la katalunan, sed de 1960 (kiam mi malfermis publikajn senpagajn kursojn de kataluna lingvo...) multaj gejunuloj studas kaj parolas la lingvon de la regiono (francoj elmigrintaj el Nord-Afriko, homoj el la norda aŭ orienta Francio kiuj venis por la suno kaj celas al pli granda akceptado). » Tio taŭgas por Rusiljono nur en la provinco de Barcelono, la kataluna estas la gepatra denaska lingvo por preskaŭ ĉiuj. Oni diris al mi, ke en Okcitanio, la plejmultoj de tiuj kiuj estas pli ol 45 jaraj scipovas la okcitanan. La aliaj ? La respondeculo respondis per unu demando : « ĉu kelkaj vortoj sufiĉas ? ». Fakte, ĉio estas tre neklara kiam oni deziras esti preciza : inter tiuj kiuj pensas, kaj sonĝas en sia regiona lingvo kaj tiuj kiuj nur ŝajnigas, estas multaj : tiuj kiuj bone ĝin scipovas, sed ĝin uzas nur kiam necesas, tiuj kiuj povas kompreni, sed ne paroli, kaj tiuj kiuj konas nur kelkajn vortojn... Laŭ iuj, la distingilo estas duobla demando : — ĉu vi povas partopreni rapidan konversacion — — ĉu vi povas babili pri iu ajn temo ? Se ambaŭ respondoj estas Jes, vi estos konsiderata kiel parolanto de la regiona lingvo.

Tiuj malfacilaĵoj faris, ke nur tre neprecizajn ciferojn mi trovis en libroj :

Alzaco havas ĉirkaŭ 1 k 1/2 miliono da parolantoj,

Rusiljono, ĉirkaŭ 200 000,

Korsikio, 200 000, eble pli,

Okcitanio, inter 1 kaj 10 milionoj !

Vaskio, ĉirkaŭ 100 000,

kaj Bretonio, ĉirkaŭ 900 000.

Kiel konkludon, oni povas diri, ke ĉie, la nombro de parolantoj de la regionaj lingvoj malpliiĝas. En ĉiu regiono, la malprosperado estis — pli rapida kaj pli profunda — en la plej altaj tavoloj de la socio

— inter la gejunuloj,

— en la urboj kaj urbetoj ;

— malpli rapida kaj malpli profunda — en la malaltaj tavoloj (kamparanoj, laboristoj, fiŝkaptistoj...)

— inter la maljunuloj

— en la kamparanoj, la montaro, la izolitaj vilaĝoj.

2. — **Kial ili parolas la regionajn lingvojn ?**

En Francio, neniu scipovas nur sian regionan lingvon, kiel ofte okazis antaŭe. Jen kelkaj respondoj al mia demando : Kial kaj kiam vi parolas vian regionan lingvon ?

— (maljuna aŭvernjano, kaj juna alzacano esperantisto) ĉar mi tiel pensas ĝi estas mia gepatra lingvo.

— (la okcitana respondeculo) « ĝi estas mia sola komunikilo por vere babili kun certaj homoj ĉirkaŭ mi pri kelkaj temoj kiuj treege interesas min (en la komenco, popola muziko) ».

— (emeritulo el norda Francio kiu venis en Perpignan) « mi lernis la katalunan kiam mi aĉetis mian domon en la regiono por pruvi al la lokaj katalunoj, ke mi intencas esti nek turisto nek fremdulo inter ili, sed unu el ili. Mi uzas ĝin ĉiufoje kiam mi havas la okazon ; mi vidas, ke tio plaĉas al ili ; tamen, ili neniam forgesas, ke mi estas nordulo. »

— (vaska komercisto) « ĉar nia lingvo estas mortanta ; mi provas ĝin savi tiel. Krome, la turistoj amas havi pruvojn, ke ili estas en fora regiono tipa. »

— (bretona instruisto en mezlernejo en St-Pol-de-Léon) « ĉar mi amas mian lingvon. Krome, mi uzas ĝin en la lernejo, kiel simbolan rebaton ; antaŭ unu jarcento, en la lernejoj de Bretonio, la knabo kiu uzis unu bretonan vorton estis punita, humiligita de la insturisto : oni ligis al lia kolo lignan ŝuon kiun li transdonos al la kamarado kiu bretonos post li... ĝis la fino de la tago, kiam la lasta portanto de la ligna ŝuo estos publike punita. Kiam mi rememoras tion, mi estas fiera, skribi en la bretona lingvo sur la klasa kajero. »

— (juna esperantisto) « Pro politika idealo. La movado por Okcitanio estas antaŭ ĉio ilo de sinliberigo rilate al la pariza kapitalisma civilizacio. Tamen, mi ne tre ofte uzas la okcitanan, kaj... ne tre bone. »

— (denove la okcitana respondeculo) « kiam mi estas fronte al turisto aŭ al ŝtata oficisto, mi uzas la regionan lingvon por ke ili sentu sin fremdaj, kaj tio donas al mi pli da kuraĝo kaj konforto, ĉar mi estas certa, ke ili gardos sian staton de fremduloj, kaj agos tiel. »

— (studento) « Mi lernis la katalunan, por koni tutan kulturon kiun mi ĝis nun ignoris, lerninte en la francaj lernejoj ian al-mi-fremdan civilizacion. »

— (provenculino) « Mi uzas la regionan lingvon kiun mi lernis en mia vilaĝo kiam mi estis juna, ĉar tio donas al mi veran plezuron. Tiu lingvo ŝajnas al mi pli riĉa, pli tipa, pli taŭga al mia spirito ol la franca. »

Mi deziras substreki plurajn punktojn : la influo de turismo (ĉu pro, ĉu kontraŭ), la simbola valoro de la regiona lingvo, kaj la konscio de la riĉeco de la regiona lingvo kiel lingvo mem kaj kiel alirvojo al bela kulturo.

3. — **Kiel oni spertas la ekziston de la regiona lingvo en la ĉiutaga vivo**

— en **privataj konversacioj,** kompreneble, sed nur kiam ne estas fremduloj.

— en **simbolaj signoj** : markoj gluitaj sur la veturiloj (BZH, OC, C...), tekstoj kaŝe pentritaj sur la muroj (« gardarem lou Larzac », « parlem català »).

La ortografio de la urboj, sur vojoj, nokte korektita

— en **ĵurnaloj kaj gazetoj** : ĉiu regiono havas regio-

najn gazetojn, ĉu en la franca, ĉu en la regiona lingvo, ĉu dulingvajn, sed laŭ ŝanĝeblaj proporcioj.

Du trajtoj estas menciindaj :

— plej ofte, oni povas legi artikolojn en la regiona lingvo en la paĝoj de la regiona franclingva taggazeto,

— tagaj gazetoj en la regiona lingvo ekzistas, sed nur en specialaj cirkonstancoj : Rusiljonanoj aĉetas la Barcelonan tute katalunan gazeton AVUI (= hodiaŭ) ; Bretonoj, en 1974, havis du tagajn gazetojn ; en Alzaco, oni ofte aĉetas germanajn gazetojn ; kaj ŝajnas, ke tute korsa gazeto aperas ĉiujn trian monatojn.

— en **artaj okazaĵoj :**

— multaj kantistoj, precipe en Bretonio

— muzikaj grupoj kiuj prezentas popolajn kantojn

— libroj verkitaj en la regiona lingvo : poemaroj, rakontoj (« Cherchepaïs », en la Okcitana), teatraĵoj (« Hem de casar en Baptista » en la kataluna), ktp...

— teatraj grupoj ; ekzistas profesiaj okcitanaj grupoj en Provenco kaj Langvedoko ; plej ofte, la aktoroj mem inventas la teatraĵon.

— en **ekspozicioj.**

— en **radio aŭ televido elsendoj** : krom en Korsiko, oni povas aŭskulti kelkajn minutojn da programoj en la regionaj lingvoj ĉiusemajne.

— ankaŭ en diversaj **preĝejoj** oni povas ĉeesti diservojn en la regionaj lingvoj, ekzemple en Bretonio, kie oni kantas en la Bretona, kaj en Alzaco.

4. — **Kiel la parolantoj de regionaj lingvoj ilin studis ?**

— La plejmulto lernis, **hejme aŭ en sia vilaĝo,** laŭ la plej natura, la plej malnova metodo, parola. Precipe maljunuloj tiel studis.

— Aliaj en **libroj :** multaj kursoj ekzistas por la diversaj lingvoj. Assimil proponas kurson por la Bretona, kaj por la Okcitana ; la B.B.C. metodo por la Okcitana estas, laŭdire la plej taŭga, ĉar ĝi respektas la diversajn dialektojn de la lingvo.

— Aliaj en **kursoj :**

— vesperaj kursoj,

— aŭ kromaj horoj en la lernejoj,

— aŭ en specialaj, sed tre maloftaj lernejoj.

Tio min kondukas al rapida pentrado de la **instruado de la regionaj lingvoj.** La **oficiala flanko** de tiu instruado estas facile priskribata : nur de 1951 leĝo permesas, ke kelkaj horoj de kelkaj regionaj lingvoj estos instruataj en kelkaj regionoj, tre ŝpare. Tiu « loi Deixonne » estis kompletigita de la tre nova « loi Haby », kiu permesas, ke la regionaj lingvoj estu instruataj en la mezlernejoj, kaj ke la rezultoj estos enkalkulitaj en la ekzamenoj. Sed tiu instruado de la regionaj lingvoj estas tre malampleksa, kaj (mi diros) duone oficiala, ĉar la instruistoj ofte estas ne pagataj, kaj devas uzi kromajn horojn.

Tial, la neoficiala flanko de tiu instruado (ankaŭ nomita « paralela ») estas multe pli interesa kaj riĉa. La instruantoj estas asocioj de geinstruistoj, aŭ de subtenantoj de la regionaj lingvoj kaj kulturoj. Ili havas grandan elekton de diversaj metodoj : vesperaj kursoj, privataj lernejoj, perkorespondaj kursoj, staĝoj, porstudaj tagoj, prelegoj, universitataj kursoj por maljunuloj... ktp.

Generale, ili havas du ĉefajn celojn :

— instrui la regionan lingvon kaj pri ĝi ;

— instrui per la regiona lingvo. Ekzemple, la « Somera Universitato pri la Okcitana » en sept. 79 en Nîmes proponis programon de : praktiko de la lingvo, historio, ekonomio, arkeologio, pedagogio, socio, lingvistiko, kanto... Dua ekzemplo estas la (laŭ mi) admirinda kreado de lernejoj, kie ĉio okazas en la regiona lingvo. Ekzistas en Bretonio ĉirkaŭ 15 tiaj lernejoj por infanoj inter 3 kaj 6 jaroj (la tiel nomataj DI WAN) ; en Rusiljono, estas kelkaj, nomitaj BRESSOLA ; almenaŭ du SCOLA CORSA funkcias en Korsiko ; la unua en Okcitanio (en Bearno) malfermiĝis en Septembro 79 ; sed la Vaskoj estas la veraj majstroj pri tio. Jen rigardo al ilia sistemo.

La asocio SEASKA en Bayonne kreis tiujn lernejojn. Kial ? « ĉiutage, ni konstatas la progresivan neniam haltantan malaperon de la vaska lingvo. » « Ni ne havis alian eblecon. Nia lingvo estis malaperanta. Kaj sen ĝia lingvo, la vaska popolo ne plu ekzistus. La Parlamento en 15 jaroj forĵetis 15 proponoj de leĝoj kiuj permesus al ni savi nian kulturon. Nun, ni ne plu petadas. Ni kreas lernejojn... kiuj tute ne estas perfektaj ; sed tiuj lernejoj eble ebligos nin resti ni-mem kaj kontraŭstari la kulturan uniformigon. » Ili komencis en 1969 ; en 79, estas 28 klasoj en la departemento, zorgantaj pri 450 infanoj (pensu, ke en Suda Euskadi, 35.000 infanoj povas sekvi instruadon en sia regiona lingvo !). ĉiujare, la nombro de klasoj plialtiĝis : 1, 3, 7, 12, 13, 14, 17, 19. En la komenco, nur por infanoj ĝis 6, poste, unu plia klaso estis kreita ĉiujare por ke tiuj infanoj povu daŭrigi sian studadon en la « Ikastola ». Nun, la plej aĝaj iras al la franca mezlernejo, sed ili estas perfekte dulingvaj. Kiu kreis la Ikastolas ? Kune instruistoj, gepatroj, kaj amikoj de la vaska lingvo. La gepatroj ofte fariĝis masonistoj, kuiristinoj aŭ transportistoj de infanoj ? Ili pagas por ke siaj infanoj iru al la Ikastola, proporcie de sia riĉeco. La gelernantoj venas el ĉiuj sociaj tavoloj ; la instruistoj estas pagataj, ofte junaj intelektuloj kiuj sekvis specialan staĝon pri pedagogio kaj lingvo vaska. La pedagogio en la Ikastolas estas vere moderna, laŭ la Freinet movado de edukistoj (parenteze movado kiu uzas Esperanton en siaj internaciaj renkontiĝoj) : bazita sur la liberigo de la infana menso, ilia povo de kreado kaj respekto de ilia personeco. En la revuoj kiujn la organizo sendis al mi, oni povas konstati kiel feliĉaj ŝajnas la infanoj. SEASKA zorgas ne nur pri la edukado en la vaska lingvo kaj progresiva enkonduko de la franca, sed ankaŭ pri la batalo kontraŭ la nur-franca kultura etoso (ili parolas pri la premilaj efektoj de la franca kulturo) ; por tiu batalo, ili kreis somerajn feriajn kampojn (en vaska lingvo) kaj porinfanan literaturon en la vaska (inter aliaj, ili tradukis la faman serion de Asteriks la Gaŭlo). Ili havas kontaktojn kun aliaj grupoj kiuj subtenas regionajn lingvojn, laŭ du direktoj : interŝanĝo de informo, precipe pedagogiaj, kaj financa helpo ; ekzemple, ili ricevis helpon el la flandra movado. Jen parto de letero de granda bretona kultura federacio al SEASKA : « Miaj amikoj petis, ke mi danku vin por viaj bondeziroj (...) kaj ke mi sendu al vi negrandan helpon de mia asocio por la pezaj kostoj viaj, per ĉeko de 200 frankoj. Tiu eta sumo ne estas multo, ni ja scias, por helpi vin : ĝi estas nura pruvo de solidareco kun via belega agado. » Kaj tio gvidas nin al la problemoj de SEASKA. La plej grava estas mono : ili tre malfacile arigas sufiĉe de mono por pagi la instruistojn kaj la aĉetojn. Ili ricevas neniun financan helpon de la ŝtato (dum privataj lernejoj ricevas tian helpon), kaj ĉiam havas la minacon esti devigataj fermi la Ikastolas pro monaj kaŭzoj. Ilia dua problemo estas pli psika : ili estas kelkfoie malbone akceptataj de la oficialaj instruistoj de kiuj ili forprenas interesajn lernantojn ; kaj de ĉiuj dekstruloj en la regiono.

(daŭrigota)

Hélène Kristos.

Finnugristo-Esperantisto : Emil Nestor Setälä (1864-1935)

Bernard Golden

Vilho Setälä estas elstara finna esperantisto, kiu ne bezonas prezentadon al la esperantistaro. Ne tiel bone konata en Esperantujo estas lia patro, Emil Nestor Setälä, kiu atingis renomon sur alia lingva tereno, la finnugristiko. Sed ankaŭ tiu altestimata lingvisto kaj politikisto plenumis signifoplenan por-esperantan laboron. En aŭgusto de tiu ĉi jaro la atento de lingvistoj kaj aliaj kleruloj estos direktita al Turku, Finnlando, kie okazos la Kvina Internacia Finnugristika Kongreso. Estas do konvene nun rememorigi pri la kontribuo de Emil Setälä al la starigo de la finnugristika lingvoscienca branĉo kaj ankaŭ pri lia sinteno rilate Esperanton.

Emil Setälä naskiĝis la 27-an de februaro 1864 en Kokemäki, Finnlando. Li komencis studi la lingvistikon kiel mezlernejano, ne nur per la gepatra lingvo, la finna, sed ankaŭ germane kaj hungare. Kiam li ankoraŭ estis lernanto, li ricevis stipendion de la Finna Literatura Societo por studvojaĝo, kies rezulto estis la unua monografio pri dialekto de la finna lingvo. En sia 16-a jaro li verkis la unuan sintakson de la finna lingvo. Tiu verko, kiu estis destinita por ĝenerala uzo, aperis en 1880 kaj estis uzata en finnaj lernejoj kaj universitatoj dum 80 jaroj.

La juna lingvoscienculo abiturientiĝis en 1882 kaj post sia doktoriĝo en 1887, li fariĝis libera docento en la Universitato de Helsinki. En 1888-1889 li entreprenis studvojaĝon en Svedio, Danlando, Germanio kaj Hungario, kaj ankaŭ ĉe parencaj finnaj etnoj apud la Balta Maro. En Germanio en 1889 li restis iom da tempo en Lejpcigo kaj tie konatiĝis kun la gvidantaj personuloj de la tiutempe revolucia novgramatikista skolo de la lingvistiko. Tiuj kontaktoj havis gravan signifon por la estonteca disvolvo de liaj vidpunktoj pri la lingvo, ĝia evoluo kaj scienca analizo.

Reveninte en la hejmlandon, Emil Setälä okupis la postenon de profesoro pri la finna lingvo kaj literaturo ĉe la Universitato de Helsinki en 1893. Kiel la unua reprezentanto de la novgramatikista skolo en la finnugristiko, li donis novan direkton al tiu branĉo de la lingvistiko en la 1890-aj jaroj, enkondukante la modernajn principojn de la filologio kaj adaptante ilin al la studo de la finnugraj lingvoj.

Emil Setälä ankaŭ daŭre okupiĝis pri politikaj problemoj en Finnlando kaj li partoprenis en la rekonstruo de la sendependa finna ŝtato. Kiam la rusa caro Nikolao la Dua ĉesigis la aŭtonomion de la Finna Granddukejo, Setälä fariĝis unu el la gvidantoj de la konstitucia partio, kiu celis per senarmilaj rimedoj rezisti la agadon de la rusoj kontraŭ la deziro de la finnoj esti memstaraj. Kiam Finnlando akiris sian sendependecon en 1917, Setälä, kiel membro de la registaro, formulis la deklaron pri sendependeco kaj preparis la leĝon por la oficialaj lingvoj de la nova ŝtato, la finna kaj la sveda. Tiu ĉi, kvankam lingvo de etna minoritato en Finnlando, estis egalrajta kun la finna. Li agis ankaŭ por certigi plenan religian liberecon en la lando.

Dum la sekvaj jaroj Emil Setälä okupis altrangajn postenojn en la registaro. En 1925 li estis Ministro pri Eduko kaj en 1926 Ministro pri Eksterlandaj Aferoj. De 1927 ĝis 1930 li servis kiel ambasadoro de Finnlando en Kopenhago kaj Budapeŝto.

Emil Setälä estis poligloto. Krom la lingvoj parencaj al la finna, kiujn li studis pro fakaj celoj, li flue parolis svede, germane kaj hungare. Kiel ministro kaj ambasadoro li kapablis uzi ankaŭ la francan kaj la anglan. Lia filo, Vilho, rakontas, ke la esperantistiĝo de la patro okazis verŝajne en 1894, kiam li akiris la **Universala Vortaro.** Poste, la patro simpatie sekvis la klopodojn de la filo, kiu komencis lerni Esperanton, kiam li estis 14-jara lernejano.



Kiel membro de la granda eldonejo **Otava,** Emil Setälä helpis la esperantistojn rilate la eldonadon de lernolibroj, vortaroj kaj la revuo **Esperanta Finnlando.** Ekde 1921 la finna parlamento voĉdone asignis jaran subvencion al la Esperanto-Instituto de Finnlando ; estis Emil Setälä, kiu instigis la registaron fari tiun gravan decidon. Ankaŭ la 14-a Universala Kongreso de Esperanto, okazinta en Kelsinki en 1922, estis subvenciita de la lando kaj la urbo. Kiel la honora prezidanto de la kongreso, Setälä prezentis festparoladon en Esperanto pri la internacilingva demando. Tiu parolado estis tradukita en la finnan kaj francan lingvojn kaj poste, kiam Setälä estis ambasadoro en Budapeŝto, la hungara traduko farita de Kolomano Kalocsay estis publikigita en prestiĝa gazeto.

Kiam la Ligo de Nacioj okupiĝis pri la internacilingva demando en la 1920-aj jaroj, Finnlando subtenis la agadon por Esperanto, denove dank'al la influo de Emil Setälä. La finna registaro oficiale deklaris, ke Finnlando estas preta enkonduki Esperanton en la finnajn lernejojn, se kvin aliaj ŝtatoj faras la samon. Krom Finnlando, subskribis la interkonsenton formale la hungara registaro, kaj anoncis sian aprobon la ĉeĥoslovaka. Tamen, la projekto fari Esperanton deviga studobjekto en lernejoj fiaskis pro manko de interŝtata konsento.

La plej grava verko de Emil Setälä pri la internacilingva problemo estas prelego, kiun li prezentis antaŭ la Finnugra Societo en Helsinki en decembro 1921. Ĝi

estis publikigita poste en la revuo de la societo, finne en 1929 kaj france en 1932. Laŭ ĝia enhavo kaj stilo, ĝi memorigas pri la klasika eseo de d-ro Zamenhof, « Esenco kaj Estonteco de la Ideo de Lingvo Internacia ». Valoras mallonge resumi la ĉefajn punktojn en la prelego, kiu estas ekzemplodona prezentado al faka publiko de la esencaj aspektoj de la problemo kaj ĝia solvo per Esperanto.

Ĉe la komenco de « La demando pri la universala lingvo », Setälä reliefigas la multlingvan naturon de la fakliteraturo, kiun finnugristoj devas koni. Poste, li montras, ke simila situacio troviĝas en ĉiuj aliaj sciencobranĉoj. Pro tio, universala lingvo alportus multajn avantaĝojn al scienculoj, sed ne nur al ili. Tia lingvo estus same utila por la komerco, turismo, politiko kaj diplomatio.

Rilate la naturon de tiu universala lingvo, Setälä konvinke montras, ke nek pazigrafioj nek naciaj lingvoj povas solvi la problemon. Estas esence, ke oni ne timu la terminon « artefarita lingvo », ĉar ankaŭ la tiel nomataj naturaj lingvoj estas diversgrade artefaritaj. Ju pli la homa volo agas sur aŭ influas ilin, des pli tiuj lingvoj fariĝas artefaritaj. Estas erare formuli la demandon jene : lingvo natura aŭ lingvo artefarita ? Prefere, oni parolu pri lingvo transdonita historie de unu generacio al alia, aŭ de unu popolo al alia, kontraste kun lingvo imitanta libere la lingvojn naskitajn historie.

La elekto de nacia lingvo ne estas solvo, ĉar ĝi donas avantaĝojn al la parolantoj de tiu lingvo. Ĉiuokaze, kiam fremduloj parolaĉos ĝin, ili refaros ĝin laŭ siaj bezonoj, kaj ĝi fariĝos artefarita. Oni do, ekde la komenco elektu artefaritan lingvon. Laŭ la opinio de Setälä, la problemo jam estas solvita en siaj grandaj aspektoj per la internacia lingvo Esperanto, kiun li karakterizas kiel « vere inĝenia malkovro ». Li rigardas kiel la ĉefajn avantaĝojn de Esperanto ĝian lingvan tipon kaj strukturon ebligantajn facilan lernadon. Cetere, ĝi havas pedagogian valoron, kreante pli profundan komprenon de la gepatra lingvo, donante al la lernanto pli vastan internacian vidpunkton kaj servante por komparado kun aliaj lingvoj.

Citinda estas la rimarko de Emil Setälä pri la traduk-taŭgeco de lingvo kiel Esperanto.

« ... fakte estas neeble **traduki** literaturajn verkojn en la reala senco de la termino : ĉiuj literaturaj verkoj, kiuj estas ligitaj al difinita lingvo, al tiu de la aŭtoro, devas, kiam oni tradukas ilin, aŭ esti transponitaj laŭ sufiĉe skema maniero, aŭ — kaj tiel laboras la artisto-tradukisto — esti rekreitaj kaj rekomponitaj. Kaj ne estas tute neeble, ke lerta tradukisto posedanta la helplingvon, povas transponi la imagojn de la originalo pli facile en tiun lingvon, kiu ne havas obstaklojn starigitajn de tradiciaj dirmanieroj, ol en lingvon, en kiu la tradicio determinas la limojn. »

Tiel konstatante, ke estas eble uzi la Internacian Lingvon por literaturaj celoj, Setälä tamen insistas, ke ĝia ĉefa rolo devas esti sur la terenoj de la scienco, komerco kaj turismo, kaj fine, en la internacia politika vivo. Li antaŭvidas, ke internacia organizado estas bezonata por atingi la celon : la instruadon de la Internacia Lingvo en la lernejoj de ĉiuj landoj.

Emil Setälä antaŭ duonjarcento klarvide komprenis la internacilingvan problemon kaj proponis solvon en prelego adresita al liaj samfakuloj. Ankaŭ hodiaŭ oni povas utiligi tiun ĉi verkon en la samaj profesiaj rondoj, ĉar la argumentoj tute ne perdis sian aktualecon kaj konvinkeblon.

PAUL ARÈNE (1843-1896)

La sangopreparitaj kolomboj

« Preparu ilin per sango ! » kriis Mariuso klinante sin super la mantelo. Kaj dum nia kampara hotelestrino, dediĉante sin al pretigo de la tagmango, faris en la teretaĝa ĉambro grandan bazarbruon, Mariuso diris al mi :

« Vi ne konis mian praonklon, la maljunan Bérévoux ?... Ne... Nu, mi ne povas manĝi sangopreparitajn kolombojn sen rememori la lastan tagmangon, kiun li proponis al mi ».

Mi ekbruligis cigaredon kaj mi aŭskultis. Estas ĉiam tiel, per ia subtile entrudiĝanta enkonduko, kiel Mariuso komencas siajn historiojn.

« Terura homo, mia praonklo ! tute malnovtempa. Post la ŝtatperforto de 1851 li prenis la fusilon kaj komandis rezistantaron. Mi ankoraŭ revidas lin tia, kia li estis je mia deka jaro : seka kaj nodplena kiel maljuna rebo, sunbrulumita pro ĉiuj translandiĝoj, fortika, kvankam li tremadis ĉiun someron pro febro kunportita el la ekzilejo. Kaj el sia disirinta familio, el sia parte perdita posedaĵo, el tuta vivo oferita al la devo, bedaŭranta vere nur la dekstran okulon krevitan de silikosplito, iun tagon, kiam li disrompis ŝtonetojn sur la vojo en la proksimeco de Lambesse.

Mia praonklo estis bona sed kolerema. Iam li batis sian plej bonan amikon, kiun li surprizis ludante pikedon kun juĝisto. Rilate religion, vera senkredulo ! Li havis en sia skribĉambro grandan Kriston, hispanan Kriston ellasantan ruĝan sangon el ĉiuj siaj vundoj.

« Kiaĵ vi konservas la bonan Dion hejme », mi iun tagon demandis lin, « kvankam vi ne ŝatas lin ? »

Li rigardis min kun sia trankvila aspekto. « Kaj se plaĉas al mi, vidi lin pendigita ! » Mi ektimis kaj ne plu parolis kun li pri lia Kristo.

Ĉiujn merkredojn vespere, je granda malespero de mia avino, tre devota, kaj kiu timis por mia juna animo, mia praonklo pasis tra nia hejmo. « Morgaŭ estos ferio, ni iros al Les Combes, la persikoj estas maturaj. » Aliajn fojojn estis la uvoj, kiuj orumis sin en la vitejoj, aŭ la ĉerizoj, kiuj ruĝiĝis. Kaj estis la vera festo, la vera ĝojo, kiam li diris al mi : « Venu por kunpreni min je plej frua horo : estas idoj en la kolombejo ! » Dum la tuta nokto mi ne fermis la okulojn pro malpacienco.

Mia praonklo loĝis tute sola en malnova domo el la pasinta tempo, tre bela, sed iom ruiniĝinta, kun

larĝa ŝtuparo balustrohava, plenega de falintaj gipsoruboj, restaĵoj de nimfoj sin kisantaj kaj de mitologiaj ĉasoscenoj. La kolombejo situis en la plejsupro de la domo post vico da subtegmentejoj, en mezepoka tureto forgesita sur la tegmentoj de tiu loĝejo en la tempo de Henriko la Dua.

« Ru... ku... ru... ku ! » faris la kolomboj. Necesis alstarigi eskalon, sublevi klappordon kaj oni troviĝis en tute blanka kabineto prilumita per vazistaso borita laŭ simetriaj aĵuroj reprezentantaj karoojn, trefojn, pikojn kaj kerojn ; la blua ĉielo lumis tra la truoj, kaj sur la planko krustokovrita de kolombosterko la suno desegnis kerojn, karoojn, trefojn kaj pikojn.

« Neniu eliru ! » kriis mia praonklo. Granda konsterniĝo, flugilbruo, pluvo el blankaj kaj grizaj plumoj ! Sed mi tiris ŝnureton kaj subite la krado falante ŝtopis la elirejojn de la vazistaso. Tiam komenciĝis la vizitado en la pendantaj vimenkorboj kaj en la brikaj alveoloj masonitaj laŭlonge de la muroj. Ĉi tie ovoj, tie lanugaj idoj ; sed ni volis nur la grasulojn ! Kelkfoje el inter la dikkruruloj kun piedoj ĉirkaŭitaj de rubandoj, kaj ŝvelparadantaj kiel markizoj el la reĝado de Luizo la Dek-kvara, ni kaptis entrudiĝinton alidevenan, iun el tiuj livioj vivantaj en la rempartruoj meze de verbaskoj kaj keirantoj.

« Ha, kanajloj ! Ili havas por si la tutan kamparon, kaj ili venas manĝi mian grenon !... Ĉu ili ne meritas, ke oni mortigu ilin ? » Tamen oni ne mortigis ilin : « Ili estas sendependaj : ni lasu al ili la liberecon ! ».

Tiam venis la ĝojoj de la kuirarto : la bestoj senplumigataj, la lardo brunrostiĝanta sur hela fajro, la tablo starigata, la tablotuko surmetata. Momentoj feliĉaj, horoj sensimilaj ! La salivo ankoraŭ kolektiĝas en mia buŝo, kiam mi pensas pri tio.

Do, iun ĵaŭdan matenon, tagon de kolomboj ! mi estis vekinta mian praonklon : veki lin ja estis ceremonio. Mi sciis, kie kuŝis la ŝlosilo : mi eniris kun nelaŭta bruo en la ĉambron, mi prenis fiŝkaptostangon tiucele lasitan malantaŭ la pordo kaj tenante min malproksime, tre malproksime, vere ! mi frapis la litlignaĵon, ĝis la dormanto vekiĝis.

« Onklo Férévoux ! Sinjoro Férévoux ! »

Subite Sinjoro Férévoux eksidis, kun la okulo ankoraŭ mismalfermita, vipante la aeron per siaj nodoplenaj brakoj li faris timegindajn kirlomovojn. Kutimo de viro persekutata ! Nevole li estus mortiginta min. Kaj, rekoninte min, li diris al mi :

« Nu, ne timu, kaj venu min ĉirkaŭbraki, sencerbulo ! ».

Mia praonklo, tiun matenon, estis gestinta pli forte kaj pli longe ol kutime. « Mi kredis, ke estis ili, ĉifoje », li murmuris interdente. Tamen ni estis suprenirintaj al la kolombejo, kaj, kiam batis la deka horo, la kolomboj, sur la fajenca plado, estis vaporantaj.

Mia praonklo ŝajnis al mi tute ne kutimstata. Li estis feste sin vestinta, glate sin razinta, kun alta blanka kravato, kiu tenadis rigida lian mentonon. Li parolis al mi pri Respubliko, kaj li interrompis sin dirante : « Vi estas tro juna, vi ne komprenas », kaj li servdonis al mi pecon da flugilaĵo aŭ kuleron da saŭco. Li ankaŭ diris al mi : « Se mi forirus kaj se mi ne plu revenus, la kolombejo estus via ».

Ĉi ĉio forprenis mian apetiton.

Ni atingis la duonon de la tagmanĝo, kiam oni frapis malaplomban baton sur la pordon. Estis Tisbet, mia amiko Tisbet, la filo de la juĝejpordisto : « Forkaŝu vin, Sinjoro Férévoux, la ĝendarmoj estos ĉi tie post kvaronhoro. Mia patro sciis tion ; li sendas min por diri ĝin al vi. Nun mi forkuras : mi perdus nian postenon, se iu min vidus tie ĉi.

Via patro estas bonulo, Tisbet ; diru al li, ke mi lin dankas. Adiaŭ — Tisbet.

— Tre bonan tagon, Sinjoro Férévoux ! »

Momenton poste, mia avino eniris. Tisbet, preterpasante, estis avertinte ŝin. Spirmanka, tute ruĝa, ŝi diris, ke Italoj, en Parizo, estis pafintaj sur la imperiestron, ke oni enkarcerigis la respublikistojn, ke tio estis cetere meritita, kaj ke li, Férévoux, pro sia politiko, meritis perei sur la ešafodo, sed ke tio estus tamen ege malagrabla por la familio. Sed ŝi ekploris kaj eltiris el sub sia kitelo sakon da eskudoj kun mielpoto.

« Reportu tion, fratino mia, kaj iru preni por mi kovrilon : mi bezonos ĝin en la malliberejo.
— Ĉu vi ne forkuras ?
— Ne. Mi estas tro maljuna !

Mia avino foriris, levante la brakojn al la ĉielo.

La praonklo daŭre manĝis kaj mi ploris super mia telero.

Fine la ĝendarmoj alvenis.

« Je la nomo de la leĝo...

— Jen, estas vi, Sambuc ? » diris mia praonklo al la ĉefĝendarmo.

« Bonvolu kredi, Sinjoro Férévoux...

— Ni foriru, mi estas preta ! » rediris mia praonklo. La ĉefo kaj la du ĝendarmoj rigardis sin, ĝenataj. La ĉefo balbutis : « Vi ne koleru kontraŭ ni, Sinjoro Férévoux, sed la ĝendarmaro pri tio povas nenion : estas ordono... » Samtempe unu el la ĝendarmoj tiris el sia poŝo ion tintantan kaj briletantan.

« Katenoj kiel por ŝtelistoj ? katenoj por trairi la urbon ? » la maljuna Férévoux retropaŝis, indignĝanta, terura ! Mi kredis, ke li saltos sur sian fusilon. Sed kvietiĝante, subite : « Venu, knabeto, venu almeti ilin al mi... Vi permesas. Sambuc, ĉu ne ? » Li etendis al mi siajn du pojnojn, kiuj iom tremis. Du magrajn pojnojn, kun multe da vejnoj. La ĉefĝendarmo Sambuc helpis min.

« Mariuso, vi memoru... Dankon, Sambuc ! » diris mia praonklo. Kaj mi vidis tra miaj larmoj, proksime al mia vizaĝo, la dikan vizaĝon de la ĉefĝendarmo Sambuc, ruĝa, hontema, elspiranta kiel kato tra siaj lipharoj. Mia praonklo, la maljuna Férévoux, havis tiam sepdek-kvin jarojn !... »

Je tiu momento la hotelestrino alportis vaporantan pladon.

« Al tablo » ekkriis Mariuso pli emociigita ol li dezirintus ŝajni, « Mi diros alian fojon la finon de ĉi tiu historio ; la sangopreparitaj kolomboj ne toleras atendi. »

el la franca, trad. R. GONIN.

Samivel kaj liaj "ordonoj"

La nomon de Samivel jam konas la legantoj de la Kulturaj Kajeroj : antaŭ du jaroj ekzemple aperis en ĉi-tiu revuo traftempa traduko ĉerpita el lia « Oro de Islando ».

Tiu tre memstara kaj multaspekta verkisto, kiu ĉiam, kiel la Kiplinga kato, laŭiris sian propran vojon, estis unue ekkonita dank'al siaj sprite ilustritaj albumoj por infanoj.

Poste, li famiĝas enlande kaj translime kiel elstara primontara verkisto ĉampiono de la protekto de la alparo kontraŭ ĉiuspecaj fuŝuloj, kaj nelacigebla edukanto de la moderna homo.

Neniu pli trafe kaj sprite, jen ironie jen tenere, ĉiam indulgeme, esprimis la spertojn, sopirojn, ĝojojn kaj indignojn de la naturamantoj fronte al la minacoj de nia detruema jarcento.

Liaj ilustritaj albumoj, noveloj kaj romanoj kuŝas sur la bretoj de ĉiuj montamantoj, kaj lia nomo nestas en iliaj koroj.

Kiu alpa vagemulo, dum glora somera aŭroro, transpaŝinte la supran randon de la malhela arbaro, alvenante al la aperta alpa paŝtejo kaj suno leviĝante, fronte al la neĝaj kaj rokaj altejoj, kaj subite droninte en torenta ĝojo de la tuta estaĵo, ne almenaŭ unufoje asociis la nomo de Samivel kun sia feliĉo ?

Dum multjara sindediĉo kaj sennombraj vojaĝoj, Samivel, protea kreanto, ne nur verkis, desegnis, akvarelis, pentris, sed ankoraŭ fotografis, filmadis, kaj prelegis talente.

Li plusekvas sian vojon, kaj al li ni bondeziras longan plukreadon por la profito de ĉiuj homoj.

Jam antaŭ multaj jaroj li pioniris pri la ideo de Naciaj Naturparkoj. Jam en bela verketo « Granda Paradizo » (1958), li priskribis la belejojn de la Itala Nacia Parko, bedaŭris la malfruiĝon de Francujo, kaj postulis la kreon de najbara franca Parko. Ne mirinde do ke de li la iniciatintoj de ia nun prosperante Parko Vanuaz (1) petis (1963) tekston, kiu iĝu manifesto de la amo kaj respekto al la Naturo.

La piedvagulo, enirante la Parkon, legas ĝin sur granda tabulo, franclingve en Vanuaz, itallingve en Granda Paradizo. Jen ĝi en nia lingvo por plia internacieco. Dankinde, Samivel afable permesis, eĉ aprobis la tradukon, aldonante : « La Esperantistoj posedas idealon ; per sia laboro, ili celas la pliproksimiĝon de la homoj ; ili nepre sampartias kun tiuj, kiuj strebas al la pluekzistado de la Naturo, vivo, kaj belo. »

Dankon, Samivel ! Ni homoj nun tro grave potencas, por ke ni rifuzu tiun rolon de protektanto. Ni homoj nun devas vigli pri la aŭroroj, silentoj, kaj riveroj. Ni nun devas konscie prizorgi la destinon de la arboj kaj bestoj ; se ne, ĉio-ĉi pereos. La ŝlosilo por konservi aŭ relerni la nepran, unike pravan sintenon fronte al la Naturo estas respektemo, afablemo, kaj neprofitemo sincera.

J.-P. BEAU.

(1) France : « Vanoise ».

oOo

LA ORDONOJ DE SAMIVEL

« La Nacia Parko protektas kontraŭ malklero kaj [vandalismo
Havaĵojn kaj belaĵojn, kiuj apartenas al ĉiuj.
La defendantoj de l'vivo estas la amikoj de la [Nacia Parko.
La amikoj de progreso kaj paco estas la amikoj [de la Nacia Parko.
La sportistoj, artistoj kaj sciencistoj estas la [amikoj de la Nacia Parko.
Jen la spaco. Jen la pura aero. Jen la silento.
La regno de l'virgaj aŭroroj kaj bestoj naivaj.
Ĉio, kion vi malhavas en viaj urboj
Estas ĉi-tie rezervita por via ĝojo.
Akvoj liberaj : homoj liberaj.
Tie-ĉi estas la lando de libereco.
La libereco bonkonduti.
La senkonsciuloj malrespektas la naturon.
Ili kredas, sin grandigi, ĝin poluciante,
Kaj eĉ ne scias, ke ĝi venĝas sin.
Ĉerpu el la trezoro de la altejoj.
Sed ĝi plubrilu post vi, ĉiuj aliaj.
Malforto timas la vastejojn.
Stulteco timas la silenton.
Uzu viajn okulojn kaj orelojn. Maluzu viajn [transistorojn.
Ne bruo. Ne krioj. Ne motoroj. Ne hupado.
Aŭskultu la muzikojn de l'montaro.
La veraj mirindaĵoj ne kostas unu centimon.
Piedirado purigas la cerbon kaj gajigas.
Enterigu viajn zorgojn, kaj ladskatolojn.
Inteligenta vizitanto postlasas nenian spuron.
Ne surskriboj. Ne detruoj. Ne malordo. Ne ruboj.
La graspaperoj estas la vizitkartoj de l'krudulo.
Rikoltu belajn memorojn, sed ne pluku la flo- [rojn.
Ĉefe, ne elŝiru la plantojn : tie kreskus ŝtonoj.
Necesas multaj herberoj por teksi homon.
Forestfuŝanto : aĉa civitano.
Kiu detruas la neston, dezertigas la ĉielon, igas [la teron sterila.
Malamiko de l'bestoj : malamiko de l'vivo, ma- [lamiko de l'estonto.
Birdoj, marmotoj, ermenoj, ĉamoj, ibeksoj
Kaj tiu tuta popoleto fela kaj pluma
Ĉiuj de nun bezonas vian amikemon por pluvivi.
Deklaru pacon al la timemaj bestoj.
Ne ĝenu ilin en iliaj okupiĝoj
Por ke la estontaj printempoj ankoraŭ ĝojigu [viajn infanojn.
Malpermesite ĉi-tie ĉasadi, escepte bildojn.
Ne bruligu fajron hazarde. Ne tendumu ie ajn.
Senpripensaj agoj foje endanĝerigas la tuton.
La Nacia Parko, jen la granda ĝardeno de [l'Francoj.
Kaj ĝi ankaŭ estas via propra heredaĵo.
Konsentu konscie, bonvolkore ĝiajn disciplinojn.
Kaj mem vartu ĝin kontraŭ vandalismo kaj [malklero. »

POR VIA DISTRO

SOLVO DE LA ANTAŬAJ PROBLEMOJ

Litera enigmo

La kaŝita deklaro de la fama komikisto Danny Kaye estis :

« Ĉiu virino povas fari el sia edzo aŭ amiko milionulon, se li jam estas multmilionulo. »

Vortplektado

La proverbo kaŝita en la 28 vortoj proponitaj estis : « Rano eĉ en palaco sopiras al marĉo ».

NOVAJ PROBLEMOJ

Ĉu estas eble ?

Bone legu tiun frazon : « En iu vilaĝo, neniu enloĝanto portas barbon ; la plejmulto sin razas mem, kaj la razisto (enloĝanto de la vilaĝo) razas ĉiujn virojn kiuj ne sin razas mem ». Ĉu vi trovas eraron en tiu frazo ?

Al kiu apartenas la zebro ?

1) Estas 5 domoj.
2) La Anglo loĝas en la ruĝa domo.
3) La Hispano havas hundon.
4) La loĝanto de la verda domo trinkas kafon.
5) La Ruso trinkas teon.
6) La verda domo staras dekstre de la ebura domo.
7) La fumanto de « Old Gold » bredas helikojn.
8) La loĝanto de la flava domo fumas « Gauloises ».
9) La loĝanto de la meza domo trinkas lakton.
10) La Norvego loĝas en la unua domo.
11) La fumanto de « Chesterfield » loĝas apud la proprietulo de la vulpo.
12) La fumanto de « Gauloises » loĝas apud la proprietulo de la ĉevalo.
13) La fumanto de « Lucky Strike » trinkas oranĝan sukon.
14) La Japano fumas « Gitanes ».
15) La Norvego loĝas apud la blua domo.

Demandoj :

Al kiu apartenas la zebro ?

Kiu trinkas akvon ?

KRISTNASKAJ DONACOJ

La avo de Johanino, Lizbeto kaj Karolino tute ne estis avara kiam temis pri kristnaskaj donacoj por la nepinoj. Tiun jaron li decidis ke li donacos al ĉiu el siaj tri nepinoj tiom da 5-stelaj moneroj kiom havis da jaroj en sia aĝo. Unu el la nepinoj tuj rimarkis ke ŝi ricevis la saman sumon kiel la du aliaj kune. Kelkaj jaroj poste, alia nepino konstatis ke ŝia sumo estis la duono de la tuta sumo ricevita de la du aliaj kune. Dum la lasta kristnaska festo, unu el la tri nepinoj estis 21 jara. Sed tiam la tri nepinoj konstatis ke la nombro da jaroj de post la komenco de tiuj donacoj estis la du trionoj de la nombro da 5-stelaj moneroj donacitaj la unuan fojon.

Kiu estis la aĝo de la tri nepinoj dum la lasta kristnaska festo ?

DIVIDO PRESKAŬ SEN CIFEROJ

Tiu malfeliĉa Fransciko venis ploranta al sia patro. Li portis paperpecon kiu havis strangan aspekton. La patro neniam vere sciis kio okazis, sed li tamen komprenis ke la knabo estis faranta dividojn kiam okazis « akcidento ». Li ĵus estis fininta unu kaj jen kio restas el tiu divido.

```
XXXXXXX | XX
XXX     | XX8XX
--------|
  XX
  XX
  --
   XXX
   XXX
   ---
     1
```

La X montras la lokon de ciferoj kiujn oni ne plu povas legi. La patro, kiu estas matematikulo tuj vidas ke oni povas retrovi ĉiujn ciferojn. Ĉu vi ankaŭ povas reskribi la dividon ?

GRAMATIKO PER BONHUMORO

KOMPLEKSAJ VERBOTEMPOJ

Por precizigi la temporilaton inter du agoj, oni uzas la kompleksajn verbotempojn.

I

9 VERBOTEMPOJ EKZISTAS EN ESPERANTO

— prezenco (perfekta, imperfekta, predikta).
— preterito (perfekta, imperfekta, predikta).
— futuro (perfekta, imperfekta predikta).

II

POR ILIN ESPRIMI ONI UZAS


La Helpverbon ESTI (neniam Havi), kiu montras la staton de la subjekto.

Unu participon, kiu esprimas la agon.

FORMO AKTIVA (INT, ANT, ONT) Kiam la **subjekto faras la agon**
— mi estas manĝanta la pomon.

PASIVA FORMO (IT, AT, OT), **kiam la subjekto ricevas la rezulton de la ago.**
— la pomo estas manĝata.

Senkonstanteco



— Li revenis el Afriko kun tiuj du belulinoj. Vidu kiel li estas fanfaronanta pri siaj konkubinoj ; kaj kiel ambaŭ estas koketantaj al li.
— Jes, kaj por ni estas la suferataj humiliĝoj.

IMPERFEKTA PREZENCO (AS, ANTA)

DIFINO (PIV) ĝi montras, ke la ago aŭ stato ne finiĝas, sed plu **daŭras aŭ ripetiĝas :**


— atendu momenton, li estas telefonanta.
— de tiu tempo ĝis nun, tiu ponto estas konstruata (kaj ne estas finita) (daŭro).
— la estroj estas akurate pagantaj la oficistojn kaj tiuj oficoj estas bone pagataj (ripeto).

Memregado



Tute laŭlonge de la tago, vi estas riproĉanta min. Kompreneble mi ne plu estas reganta miajn gestojn ; ĉio, kio pasas en miaj manoj estas kvazaŭ punata. Iom atentu, vi estas ĉiam ĉion fušanta.

Malica ĝenio obstinas



Jam de unu momento vi estas batalanta kontraŭ tiu faldseĝo ; sed šajnas al mi, ke ĝi ankoraŭ ne estas preta esti venkata. Rapidu, mi volas foti vian venkon.

Niaj perantoj

Aŭstrio : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (160 aŭstr. ŝil.).

Belgujo : S-ro Guyot Mateo, 12, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (280 fr.).

Britujo : S-ro K. Mac Lennan, 30 Lower King's Avenue — **Exeter,** EX 4 6 JT (4,80 pundoj).

Danlando : S-ro Ulrik Rasmussen, Norregardsvej 66, 2610, RODOVRE, Ĝiro 6.83.46 (50 kr.).

Finnlando : Libra Mendoservo Esperanta, kivistöntie, 05510 Hyvinkää 51 (35 mk).

Germanujo Okc. : S-ro Joseph Bode, 35 - KASSEL-OBERZWEHREN, Hinter der Brücke 22, pĉk Frankfurt (M) 2347 59-601 (18 mk.).

Hispanujo : S-ro Francisco Sanchez Anton, Avda Salamanca 42-10° - D ALICANTE (650 pes.).

Israelo : Adrian Boldan, Merkaz Klitah, ATLIT (10 us. dol.).

Italio : S-ro Gaudenzio Pisoni, via Benedetto Alfieri, 24, 28100 NOVARA — p.ĉ. 23/16532 (7000 liroj).

Japanujo : S-ro Tara Nišiumi, section Seiyoshi, ĉhuo-Universitato, 742 Higaŝi-Nakano, Hatiôzi-ŝi TOKYO-TO, J-192.03 (2 400 jenoj).

Jugoslavio : Slovenia Esp. Ligo, Komenskega 7, LJUBJANA, poŝtfako 239 (10 U.S. dol.).

Nederlando : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, CAPELLE AAN DEN IJSSEL. ZH pĉk 209721 (20 guld.).

Norvegujo : S-ino Louise Bœ Maridalsveien 128 A OSLO 4.

Peruo : S-ino Skotte, Malecon Paul-Harris, 336, Dto 200 BARRANCO (Lima) (10 us. dol.).

Pollando : Pola Esperanto-Asocio, Jasna 6, VARSOVIO (10 us. dol.).

Svedujo : ESPERANTOFORLAGET, Fack. 200 42 MALMO 7, ĝiro 578 (35 kr.).

Svislando : S-ro Cl. Gacond, Miéville, 133 - 2314 LA SAGNE (20 fr.).

Usono : S-ro Bern Wheel, Books, 834 Wenonah, Oak Park IL 60 304 (10 us. dol.).

Aliaj landoj : Ni Serĉas perantojn en aliaj landoj : abonprezo : 10 us. dol. aŭ 25 internaciaj respondkuponoj.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iajn ajn karavanojn frue anoncitajn

Akceptas :

Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
Por eklerni aŭ plulerni la internacian lingvon ;
Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
Por studi specialajn problemojn ;
Por inter amikoj gaje libertempi ;
Por ekskursi tra centr-okcidenta Francujo.

VENU AL LA ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :
ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo.

Sablé-sur-Sarthe. — Imprimerie Coconnier. — N° C.C.P.P. 36.258 Le Gérant : P. BABIN

Supplément au n° 2 de 1980, de « KULTURAJ KAJEROJ »

LA VIE DE GRÉSILLON

ENTRE NOUS...

« L'année du patrimoine ». C'est ce qu'on nous annonce. Pour le patrimoine grésillonnais, il n'y a pas d'année privilégiée. Une partie importante des énergies et des moyens financiers servent depuis toujours à le conserver, à lutter contre le vieillissement des choses. Chaque jour nous apporte l'occasion de constater la détérioration de telle ou telle partie de ce patrimoine.

Les visiteurs admirent souvent l'harmonie de l'ensemble château-parc et du parc lui-même. L'étang joue un rôle important dans cette harmonie due en partie à l'île et au petit pont de bois. Ce dernier, malheureusement, nous cause des soucis. L'an dernier nous avions dû en limiter l'accès. Nous avons fait faire un devis pour sa restauration. Il faut le refaire entièrement et le coût de l'opération serait de 12.000 francs. La somme dépassant nos possibilités actuelles, il est plus sage de le faire consolider afin que l'accès n'en soit pas dangereux. Cela nous donnera le temps de réfléchir au financement de la reconstruction de cet élément indispensable à l'attrait exercé par le parc, de cette partie d'un ensemble décoratif.

L'entretien du patrimoine dépend évidemment du succès de nos stages. Il semble que cette année encore les différentes périodes recevront un nombre appréciable de participants. Un certains nombre d'amis retardataires risquent de ne recevoir le logement désiré, en particulier pour la première période qui s'annonce très intéressante par la variété des conférences et les sujets traités. Nous attirons une nouvelle fois l'attention des personnes qui sont attirées par un séjour à Grésillon qu'une réservation n'est enregistrée que lorsque le bulletin et les droits d'inscription nous sont parvenus. Le fait d'écrire en février que l'on viendra en juillet à une période que l'on ne peut pas préciser ne vaut pas inscription, même si une « avance sur séjour » accompagne la lettre. Il ne nous est pas possible de réserver une chambre sur des données imprécises, alors que nous pourrions être amenés à la refuser à d'autres amis qui expriment clairement leurs désirs.

Au moment ou j'écris ces lignes, la rencontre internationale d'enfants vient de se terminer, et celle des cheminots espérantistes commence. Le nombre des participations à l'une comme à l'autre est satisfaisant. Nous parlerons du contenu et du fonctionnement à l'occasion de l'Assemblée générale du 27 avril.

P. BABIN.

Assemblée générale du Dimanche 27 Avril 1980

L'assemblée générale ordinaire des sociétaires de la Maison culturelle espérantiste s'est réunie le 27 avril 1980. Le nombre des présents et représentés était de 274. Le quorum étant atteint, la séance est ouverte à 10 heures.

M. Boyer est élu président de séance.

Rapport financier

Le compte d'exploitation et le bilan de l'exercice de l'année 1979 sont présentés par le trésorier, Dominique Babin. Il ressort une augmentation des recettes de 4 %, alors que les dépenses augmentent de 10 %. Ces dépenses ont augmenté de façons diverses selon les postes : + 20 % pour les charges et assurances, + 0,3 % pour l'alimentation, et + 16,7 % pour les salaires. Le trésorier souligne que la disparité entre les augmentations des recettes et des dépenses obligera probablement le Conseil d'administration à augmenter les tarifs de façon plus importante que d'habitude pour l'année 1981.

Le compte d'exploitation et le bilan de l'exercice sont approuvés à l'unanimité par l'assemblée générale, après quitus des commissaires aux comptes.

Résolutions capital social

L'assemblée générale enregistre le remboursement de 62 parts et l'arrivée de 123 nouvelles parts. Le nombre de sociétaires de la Maison culturelle espérantiste est désormais de 480 pour un capital social de 109.000 F.

Rapport d'activité

Le président, M. Pierre Babin, rend compte de l'activité de la Maison culturelle au cours de l'année 1979. Il ressort de ce rapport que le nombre de participants aux différents stages a été sensiblement égal à celui de l'année 1978. Le séjour des enfants, pendant les vacances de printemps, a confirmé son succès. Les deux premières périodes de l'été ont été assez semblables à celles des années précédentes. En ce qui concerne la troisième période, l'expérience qui a été tentée d'orienter les activités vers un aspect plus pratique a donné des résultats encourageants. C'est une formule qui a plu et qui a montré qu'il était aussi possible de se perfectionner dans la langue autour d'activités manuelles. Elle sera donc reprise en 1980.

Le compte d'exploitation est le reflet de ces activités.

Ce rapport d'activité est approuvé à l'unanimité.

Elections pour le renouvellement de la moitié du Conseil d'administration

MM. Guillaume et Jelenc ne se représentaient pas. L'assemblée générale tient à les remercier pour leur collaboration dans le fonctionnement de la Maison culturelle.

Le vote a donné les résultats suivants :

Votants, 242 ; bulletins nuls, 2 ; exprimés, 240 ; majorité absolue, 121.

Ont obtenu : M. M. Bodereau, 229 voix, élu ; M. G. Daisron, 236 voix, élu ; Mme E.-L. Mathé, 240 voix, élue ; Mme M.-T. Micard, 239 voix, élue ; M. F. Le Magadure, 240 voix, élu ; Mme J. Vincent, 156 voix, élue.

Ont également obtenu des voix les sociétaires non candidats suivants : M. Métivier, Mme Babin, Mme Prévot, Mme Cheverry, M. Guillaume.

L'assemblée générale désigne comme commissaires aux comptes pour l'année 1980 : M. Prévot et Mlle Ergoll.

Questions diverses

— Une trombe d'eau a endommagé le plafond du bureau et la moquette de la chambre qui se trouve au-dessus. Des négociations sont en cours avec l'assurance, car cette trombe d'eau a été très localisée et n'a pas été signalée à Baugé.

— Le devis pour construire une autre bibliothèque s'élève à une somme comprise entre 7.000 et 8.000 F.

— Le devis pour l'installation d'un réseau électrique convenable dans les bâtiments annexes s'élève à 11.000 F.

— M. Babin pose la question du remplacement de l'électrophone du salon. Une solution est proposée consistant à installer un amplificateur sur lequel pourraient se brancher un magnétophone ou un tourne-disque. Ce problème reste à l'étude.

— Certaines tables de la salle à manger ne sont pas pratiques. Leur remplacement est envisagé.

— Les tables rondes du salon présentent des signes de fatigue. Il faudra également penser à les remplacer.

— La souscription pour un photocopieur n'évolue pas à un rythme suffisant pour l'achat d'un photocopieur de qualité satisfaisante ; il est envisagé d'acheter un duplicateur à alcool.

— Le pont qui conduit à l'île est en mauvais état. Le devis de sa réfection s'élève à 12.000 F. Une réparation provisoire permettra d'attendre que la somme nécessaire soit disponible.

— Le couloir du deuxième étage doit être aménagé. Plusieurs solutions sont présentées par M. Babin.

— Le devis du branchement du château au compteur d'eau de la ville, qui se trouve à l'entrée de l'allée, s'élève à 34.000 F. Cette somme paraît trop élevée à certains membres de l'assemblée générale. La question sera discutée à nouveau avec l'installateur.

— Les peupliers du parc ont 25 ans, et il est temps de les abattre. Il faudra chercher les personnes susceptibles d'être intéressées par l'achat de ces arbres, et les possibilités de les remplacer.

— La salle de conférences est souvent très froide, surtout au début de la saison. Deux appareils de chauffage au mazout ont été proposés. Ils seront essayés avant d'être achetés.

— Le cours par correspondance du 1er degré ne semble plus bien adapté aux goûts des élèves actuels.

L'ordre du jour étant épuisé, l'assemblée générale est close à 13 heures.

Le secrétaire de séance :
J.-P. GUILLOT.

Conseil d'administration du Dimanche 27 Avril 1980

Sont présents : MM. et Mmes D. Babin, P. Babin, Boyer, Cheverry, Ciret, Dairon, Guillot, Mathé, Métivier, Micard, Prévot, Vincent.

Excusés : MM. Bénistant, Chevalier, Le Magadure.

Election du bureau

Après avoir accueilli les nouveaux membres, M. Le Magadure et Mme Vincent, le Conseil d'administration renouvelle son bureau de la façon suivante : président. M. P. Babin ; vice-présidente, Mme Mathé ; secrétaire, M. Guillot ; trésorier, M. D. Babin.

Stages passés

— Printemps. 70 personnes ont assisté à la rencontre d'enfants et au stage de pédagogie. M. Bodereau, responsable de ce stage, note le manque d'encadrement des enfants et souhaite l'installation d'un poste téléphonique près de la cuisine. Sur le plan culturel, ce stage a été un succès.

— Stage des cheminots, Il a réuni 30 personnes pendant la semaine et 63 le dimanche.

Stages d'été

— La première période se déroulera sous la responsabilité de M. et Mme P. Babin. De nombreux conférenciers étrangers et français sont annoncés. Des cours seront assurés en cas de besoin. Il y a déjà 60 inscrits.

— La deuxième période aura pour responsables M. et Mme D. Babin. Le cours 1er degré sera assuré par Mme Childs Mee ; le cours 2e degré par M. Lloancy, et le cours 3e degré par MM. Mollison et M. Ribot.

— La troisième période sera sous la responsabilité de M. et Mme Guillot. Elle se déroulera autour des activités photographie et danse, dirigés par M. et Mme Grela ainsi que M. H. Boyer. Les cours d'espéranto seront organisés à la demande des participants et dirigés par Mlle Turbillon pour le 1er degré, M. F. Boyer pour le 2e degré et M. Parisot pour le 3e degré. Le nombre des inscrits à ce stage (38) est supérieur au nombre habituel à cette époque.

Passages

Le Comité d'expansion du Baugeois a retenu le château pour trois semaines en demi-pension, au cours des mois de mai et juin, afin d'organiser des stages de connaissance de la région.

Un passage scolaire est prévu, ainsi qu'un stage à la Pentecôte.

Travaux

Le sol du couloir du deuxième étage, qui devient dangereux, sera cimenté.

Divers

— Un compte sera ouvert à la B.P.B.A. en remplacement de celui qui existe actuellement à la B.N.B., pour des raisons de commodités.

— En 1982, la Maison culturelle aura 30 ans. A cette occasion, il est prévu de mettre en chantier un album-photo retraçant la vie de la Maison.

Le secrétaire de séance : J.-P. GUILLOT.

NOUS TENONS EGALEMENT A VOTRE DISPOSITION :

Cartes postales de Grésillon, noir	:	0,80
couleur	:	1,00
Cuillères de collection	:	25,00
Pendentifs	:	20,00
Porte-clés	:	20,00
Coupe-papier	:	35,00
Thermomètres voitures	:	35,00
Etoiles pour vitres de voitures	:	4,00

Pensez à acheter :

FALSAJ AMIKOJ

en Esperanto

de R. Bernard et A. Ribot

3,50 F. (+ port : 4,45 F.)

VOUS POUVEZ COMMANDER

Vos livres d'étude
Vos dictionnaires
Vos livres de littérature, poésie, théâtre, histoire, géographie, sciences, à notre Service Librairie

à M. CIRET
« La Timeraie »
VIEIL-BAUGÉ - 49150 BAUGÉ

Etablir les chèques de paiement à :

MAISON CULTURELLE ESPERANTISTE
C.C.P. Nantes 1485-39

Prix franco au-dessus de 50 Fr.

POUR VOS COURS DE PERFECTIONNEMENT

Le livre qu'il vous faut :

POR LA PRAKTIKANTOJ
de P. Babin

Prix : **20,00 Fr.** + Frais d'envoi

NOS COURS PAR CORRESPONDANCE

Cours 1er degré. — 16 livrets illustrés qui permettent d'acquérir les bases essentielles de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 2e degré. — 14 leçons présentées sous forme de feuillets. Permet d'acquérir une connaissance pratique de la langue. Cours et corrections : 60,00 F.

Cours 3e degré. — Excellent entraînement à un cours supérieur : versions, thèmes, étude de textes. Cours et corrections : 40,00 F. Nous pouvons fournir les livres de cours à ceux qui ne les possèdent pas déjà.

LES EXTRAITS DE NOTRE

CATALOGUE

...aujourd'hui

TRIGROŜA ROMANO

de **B. BRECHT**